

Literatura Mondo, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 461, 1972.08.09 & 12

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj someraj elsendoj ni rigardas al la revuo *Literatura Mondo*, kiu naskiĝis antaŭ kvindek jaroj kaj tiom influis la esperantan kulturon.

A.- La unuaj jaroj de *Literatura Mondo* ne estis senzorgaj. La nombro de la abonoj ne povis garantii sendeficitan eldonadon. La abonantoj variis inter 300 kaj 500. De 1922 ĝis 1924 Teodoro Schwartz kovris la deficitajn. Kiam lia monujo sekiĝis, tiam Hungara Esperanto-Instituto transprenis la rolon de mecenato ĝis 1926. Ekde tiam *Literatura Mondo* ĉesis aperi dum 5 jaroj, por poste renaskiĝi pli vigla kaj pli matura ol antaŭe. La infanecon de *Literatura Mondo* karakterizas helpkrioj. Ni hodiaŭ legos al vi erojn el tiuj financaj alvokoj, kiuj grandigas la kuraĝon de Teodoro Schwartz kaj de liaj helpantoj Kolomano Kalocsay kaj Julio Baghy.

Cl.- La unua numero en oktobro 1922 komenciĝas per alvoko. Ni citas :

A.- « *Naskiĝis gazeto. Gepatroj, parencoj, konatuloj staras ĉirkaŭ la lulilo kaj penas, kun timema espero, diveni la sorton de la novnaskito. Alvenas D-ro Okulvitro kun venena krajonlanko en la mano, vestita per malbonhumoraj recenz-manuskriptoj kaj grumblante, ektirinte sian longan barbon, li diras :*

Cl.- « *La infano ne estas vivkapabla, ĝi estas herede malsana, la gepatroj ja suferas je peza malsano, je la Gazetfonda Febro.* »

A.- *Gepatrojn, parencojn, konatulojn, kial nei, ekkaptas timo. Tamen ili esperas. Ili atendas la venon de bona feino. Ili scias, ke la ĉarma Feino de l' Arto vagas senhejme tra la Esperanta mondo. [...] Ĉu ŝi ne helpos la infanon, kiu ŝin elektis patronino adorata? Gepatroj, parencoj, konatuloj esperu ! Vi elektis bone ! La Arto estas potenca patronino. Je ŝia dolĉa voĉo la homoj plezure malfermos por nia infano la koron. Kaj – eble eĉ la monujon.* »

Cl.- Malpli poeziaj estis la postaj alvokoj. Foje kuraĝigaj, ili tamen pli kaj pli anoncis la krizon de 1926. Ni citas :

A.- Novembro 1922 : « *Kun sincera ĝojo ni povas konstati, ke nia espero ne estis vana kaj [ke] la laboro, destinita por realigo de jam delonge atendita revo pri literatura presorgano, estis renkontanta entuziasman aprobon jam en la komenco. Amaso da gratulaj leteroj alvenis en nian redakcejon, kiuj admonas nin por plua persista penado.* »

Cl.- Decembro 1922 : « *Ni venas kun malplenaj manoj al vi, ĉar kune kun niaj bondeziroj ni metas sur vian tablon la plej freŝan numeron de **Literatura Mondo**. Ĝi estas vere donaco, kiu postulis de ni oferojn, sed ni faris tion volonte, ĉar per tio, ni volis esprimi nian dankon por la sincera kaj komprena akcepto. [...] Per tiu ĉi numero ni volas doni pruvon al vi pri tio, ke niaj entuziasmo, persisteco, sindonemo al la grava entrepreno ne malpliigis, eĉ plifortiĝis.* »

A.- Februaro 1923 : « *Jen nia kvina numero, la plej efika pruvo, ke ni iras la vojon celitan. La skeptika profetaĵo pri **Literatura Mondo**, ke ĝi ‘post du tri numeroj aperos jam ne regule kaj en pli malgranda amplekso’ ne realiĝis.* »

Cl.- La unua S.O.S. aŭ helpokrio aperas en aprilo 1923 : « *Ni mensogus dirante ke niaj revoj efektiviĝis. Ni imagis iel tiamaniere, ke Esperanto, kies evoluo dependas nepre de ĝia literaturo, certe bezonas literaturan gazeton.* [...] »

A.- *En ĉi tiu nia opinio firmiĝis nin la leteroj de eminentaj kaj klarvidaj samideanoj.* [...]

Cl.- *La abonantaro de nia gazeto certe kreskus multe pli rapide, se ne malhelpus ĝin indiferenteco ĝuste de la parto de la oficiala Esperanta vivo kaj de la parto de la Esperantaj gazetoj. Ĉi tiu indiferenteco multfoje jam tuŝas la limojn de la malbonvolo.* »

A.- Majo 1923 : « *Ne atendu, ĝis la revuo montriĝos certe vivkapabla. Se ĉiu atendos, la revuo nepre mortos.* [...] »

Cl.- *La revuon ni rigardas nur semo, el kiu povos ĝermi impona kaj belega kreskaĵo ; ornamo, eĉ garantio por nia movado. Ne lasu perdiĝi la semo en la Saharo de l’ indiferenteco.* »

A.- En aŭgusto 1923 aperas alvoka poemo, el kiu ni citas :

Cl.- « *Per via helpo certe prosperos nia verko...
Sed por la arbo estas necesa – ankaŭ sterko.
Kaj evidente estas ĉi tiu sterk’ – la mono.
Jen, kial sonas, kara publiko la admono
Kaj peto por subteno : por lego kaj abono.* »

A.- Decembro 1923 : « *Kun iom da fiero ni povas diri, ke ni faris kion ni promesis kaj kion ni povis. Sed ĉu la Esperantistaro faris, kion ni atendis de ĝi ? [...] Ĉu ne estas hontinde, ke la sola granda literatura organo de Esperanto vivas nur per la oferemo de l’ eldonanto, ĉar la Esperantistaro ne povas vivteni ĝin ?* »

Cl.- Januaro 1924 : « *Estas multaj kiuj kun ni esperas, kun ni angoras, kiuj sentas la gravecon de Esperanta literatura centro kaj ĉagrene bedaŭrus ĝian malaperon.* »

A.- Februaro 1924 : « *Ni ne forgesu ke ni estas tre malgranda popolo, vivanta **nur** per sia lingvo. Kaj ĉi tiu lingvo vivas per sia literaturo. Do amu ĝin kaj oferu por ĝi !* »

Cl.- Januaro 1926 : « *La popolo remaĉas sian gramatikan scion aŭ nenifarante portas la kvinpintan stelon, nekonsciante kion ĝi signifas en la evoluo de la Mondospirito, neglektas la heroajn laborojn de siaj gvidantoj, ignoras, kritikas, malhelpas. UEA vane helpkrias por la dekmil membroj, **Heroldo de Esperanto** perdis pli ol mil abonantojn dum unu jaro kaj **Literatura Mondo** staras ĉe la rando de la indiferent-abismo, kiu senindulge glutos la solan literaturan organon de nia movado.* »

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!